nostikaj laboratorioj. Krom tio, en la nove establita "Vojaĝmedicina Centro" (kiu estas interrete atingebla per *www.gesundes-reisen.de*) estas ofertataj konsiloj pri vakcinado kaj aliaj prisanecaj konsultiĝoj. Dum la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo 1974, por d-ro *Shinoda* el Japanujo kaj aliaj membroj de la Internacia Medicina Esperanto Asocio estis organizitaj de la aŭtoro kaj la scienca *BNI*-stabo pri specialaj fakaj prelegoj pri la institutaj esploraktivecoj.

Verdire, Hamburga Tropika Instituto estas la plej grava eduka kaj trejnada institucio por tropikaj medicinistoj en Germanujo. Tropikaj malsanoj plioftiĝas ankaŭ en mezeŭropaj landoj, ĉar unuflanke la homoj pli ofte vojaĝas en forajn tropikajn landojn, aliflanke la tutmonda homa migrado ja mondovaste konsiderinde plialtiĝis. Dum la ĝeneralmedicina universitata instruado kaj klerigado la instruado pri tropikaj malsanoj tute ne ricevas sian laŭgravecan parton. Tial ĉiujare proksimume 60 medicinistoj partoprenas la 3-monatan specialan kurson "Tropika Medicino kaj Medicina Parazitologio" kun speciala diplomo *(DTMP)* ofertita de *Bernhard-Nocht*-Instituto. Baldaŭ sekvos plikleriga intensivkurso pri "vojaĝmedicino".

La direktoroj de la sekcioj imunologio, molekula parazitologio kaj de la sekcio pri fundamenta scienca esplorado de tropika medicino havas katedrojn kadre de Hamburga universitato. Pli ol dekduo de la sciencaj kunlaborantoj de *BNI* estas universitataj instrukomisiitoj en la fakoj medicino, biologio kaj ĥemio. Pli ol 50 doktorantoj laboras en *BNI*, kiu krome ankaŭ klerigas stipendiulojn el tropikaj landoj.

La fakto, ke *Bernhard-Nocht*-Instituto estas "nur" sekcio de la hamburga ministerio pri sanitaraj servoj, iom kontraŭstaras la altgradan sciencan reputacion kiun la instituto ĝuas ne nur en tropikaj landoj kaj ĉe individuaj kuracistoj-esploristoj, sed ankaŭ ĉe Tutmonda Organizaĵo pri Sano *(WHO)* en Ĝenevo. Eble iam post la tiuĉijara fiera centjariĝo ĝi fariĝos memstara "Scienca Fondiĝo" kun tutmondaj kaj internaciaj sciencaj taskoj.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. R. Sachs
Vor dem Brückentor 3
DE - 37269 - Eschwege / Germanio

Priaŭtora informo

La aŭtoro estis membro de la scienca stabo de *BNI* ekde 1969 kaj habilitiĝis kaj profesoriĝis ĉe la Hamburga universitato. En 1976 li akiris la Diplomon pri Tropika Medicino kaj Parazitologio *(DTMP)*. 1979 prof. *Sachs* fariĝis direktoro de la esplorlaboratorio de *BNI* en Liberio ĝis ties perforta fermo pro la intercivitana milito en 1990. Poste li docentis ĉe universitato de Hamburgo en la naturscienca fakultato pri medicina parazitologio ĝis emeritiĝo en aŭgusto 1992.

Scienca Revuo Vol. 51 (2000) (3)

La sanktulo Bonifaco

G. KALKHOF

Enkonduko

Vizitanto de la katedralo en la urbo Fuldo *(Fulda)*, Germanujo, apenaŭ neglektos iri al la tombo de la sanktulo Bonifaco. Tiu troviĝas kiel marmora sarkofago sub la ĉefaltaro en la kripto. En reliefaj bildoj ĝi prezentas vivostaciojn de la fama eklezia viro, precipe kiam li devis morti - perforte kaj martire. La vizitanto ekscios, ke tiu "apostolo de la germanoj" kolektas al sia tombo ĉiujare la katolikajn episkopojn de Germanujo, memorigante ilin pri la kristana agado de Bonifaco kaj por daŭrigi sian spiriton.

Kiu estis tiu sanktulo, kiu vivis tiom diotime kaj finiĝis kiel martiro? Ĉu li kristanigis la germanojn? Pro kio ĝuste en la germana urbo Fuldo li trovis eternan ripozejon? Kial la katolika eklezio adoras lin per episkopa kunveno?

La situacio de eklezio kaj ŝtato en frua mezepoko (ĉirkaŭ 600 - 700 post Kristo)

Nomi Bonifacon "apostolon de la germanoj" fakte estas malĝusta. Kiam li vivis (lia precipa agado rolas en la unua duono de la oka jarcento, ĉ. 710-750 p.K.), Germanujo tiam tute ne ekzistis, kaj la kristanigo en la regiono - hodiaŭ fakte grandparte apartenanta al Germanujo - estis jam finita. Ankaŭ la romia-katolika eklezio, prezidata de la papo, ne ekzistis en la formo kiel ĝi estas konata en pli moderna epoko.

Certe la tiamaj papoj pretendis gvidan pozicion, fakte ili staris karikature meze de ĥaosaj ŝtatordoj. Kvankam ĉie, kie ekzistis ŝtatordo, episkopoj administris siajn posedaĵojn, tamen ili ne ĉiam plenumis siajn devojn rilate al la papo (ofte ankaŭ al la kredantaro) klopodante serĉi siajn avantaĝojn.

Papa malforto

Fakte la papo estris la urbon Romo - depende de la tiea nobelaro kaj daŭre minacata de la italaj landestroj. Same, episkopoj kaj klerikaro dependis de siaj lokaj landestroj kiuj aŭ obeis la eklezian regularon - aŭ pli-

riĉigis sin de la eklezia bienaro. Parte subtenate, parte malhelpate, ili kunlaboris kun la monaĥaro kiu misiis laŭ du kontraŭaj doktrinoj kaj regularoj.

La ordeno de la benediktanoj (prenintaj sur si la nomon de sia fondinto *Benedikto de Nursia*) postulis severan obeemon al la abato, estro de la monaĥa komunumo, kaj al la papo en Romo. La vivo de la unuopaj monaĥoj estis laŭ la devizo: *ora et labora* (preĝu kaj laboru). Post fondiĝo de la ordeno sur Montokasino (*Monte Cassino*) en la Apenina Montaro (ĉ. 540 p.K.), ĝi disvastiĝis en ĉiuj okcidenteŭropaj landoj kiel prototipo de pieco kaj klereco.

La alia ordeno, kiu evoluiĝis ekstere de la papa - do, katolika - eklezio, ne estis uniforma organizaĵo. Ĝi estiĝis en Irlando dum la 5-a jarcento, kaj sub la sanktulo Patriko (*Patricius*) ĝi formiĝis kiel misiistaro. Unue ĝi misiis tutan Irlandon, de kie ĝi transiris al Skotlando. Sur la insulo "Iono" *(Iona)* la sanktulo Kolumbano fondis monaĥejon (563 p.K.) kaj misiis sudan Skotlandon kaj la nordan parton de Anglujo. Liaj posteuloj paŝon post paŝo kristanigis hodiaŭan Francujon kaj la okcidentan parton de Germanujo, unuope migrante disen en la nomo de Kristo (*peregrinatio propter Christum*). Kvankam ili tie influis certagrade la kristanan vivon, ili ne povis kontraŭstari la katolikismon, ĉar ilia doktrino nek agnoskis la papon nek estis sufiĉe subtenata de la landestroj.

La Merovingoj

En la tiama eŭropa ŝtatordo de la frua mezepoko (inter ĉ. 400-800 p.K.), Bonifaco aktivis precipe en la regionoj de la nunaj Germanujo, Francujo, Italujo kaj Anglujo. Post la disfalo de la romia imperio, en ĝiaj provincoj estiĝis novaj ŝtatoj. En la iama provinco Gaŭlio fondiĝis franka regno, etendiĝanta okcidenten ĝis Ĝermanujo (t.e. la Federacia Respubliko Germanujo ĝis 1990 sen Malsupra Saksujo) kaj la tri beneluksaj ŝtatoj.

La regno Frankujo, regata de la dinastio Merovinga, rigore gvidata precipe de la unua reĝo Klodovigo, disdividiĝis dum tiu tempo: regis ne nur unu reĝo, sed ĉiuj dinastianoj ŝajne regis egalrajte. Pro tio la reĝa potenco malfortiĝis kaj la unuopaj merovingidoj dekadencis. Ekde la 8-a jarcento la reĝan potencon tiregis al si la administrantoj de la reĝa bienaro, nomataj majordomoj (lat. *maiordomus*), do eminentaj nobeloj. Unue regis - kvazaŭ reĝo - Pipino II-a la meza (687), sekvata de Karlo Martelo (714-741), Karlmano (741-747) kaj Pipino III-a la minora (747-751).

Unuflanke tiuj "administrantoj" distingiĝis per sia milita agado, precipe Karlo Martelo, kiu forpelis la saracenojn el Frankujo en la batalo de *Tours* kaj *Poitiers* en la jaro 732, aliflanke ili uzis la katolikan eklezion por sekurigi sian potencon. Pro tio ĉiuj klerikoj, inkluzive la episkopoj, devis submetiĝi al ilia regno. Nun ne sole la eklezia bienaro dependis de ilia kvazaŭreĝa volo, sed ankaŭ la ekleziaj doktrino kaj rito devis okazi laŭ ilia ŝtatordo. Tio signifis, ke la katolika eklezio konformiĝis tute nacie, apenaŭ ligite al la papo en Romo. Tamen la papo ne kontraŭstaris tion - male: li estis protektata. Finfine Pipino II-a unuiĝis kun papo Zaĥario, havigante al li la mezitalan teritorion ĉirkaŭ Romo: nomata "Pipina Donacaĵo". Reciproke la papo aprobis la elekton de Pipino al reĝo, sed nek kronis nek unktis lin (751).

La papo bezonis tian protekton de la ĉiam plifortiĝinta franka reĝo. Ĉar ĝis tiam li vivis en konstanta dilemo, premate de la orient-romia imperiestro en Konstantinopolo, kiu postulis ne nur regnon en grandaj partoj de Italujo sed ankaŭ pretendis superregadon en ekleziaj aferoj. Krome la langobarda regno (en supra Italujo) ĉiam minacadis lin, kaj en suda Italujo la islamaj saracenoj okupis grandan landparton. Tiel la papo posedis nek eklezian nek sekularan potencojn.

La situacio en Anglujo

Apartan rolon ludis la politikaj aferoj en Anglujo aŭ Britio, respektive. Tie regis diversaj reĝoj de malgrandaj landoj de ĝermana deveno. Situante ekster la vidkampo de la ŝtatordo ili tamen gravis. Ĉar de tie motiviĝis nova ordo, precipe eklezia. La iro-skota monaĥaro etendiĝis kaj transiris misie al Frankujo.

Inter la regnoj distingiĝis la reĝlando Kento en suda Anglujo, kies reĝo Etelberto (*Ethelbert*) ne nur estis pli grava ol la aliaj reĝoj sed ankaŭ donis impulsojn al la kristana vivo. Li malfermis sian regnon al la katolika eklezio (eble instigite de sia edzino, kiu estis merovinga princino).

Sendite de papo Gregoro la Granda, venis al la reĝa korto la benediktano *Augustinus* (596). Li evoluis viglan katoliko-monaĥan vivon, kiu influis ankaŭ la aliajn anglajn reĝlandojn dum la posta tempo.

La morto de Etelberto (616) interrompis la benediktanan agadon. Kvankam malhelpate de la irlanda-skotaj monaĥoj, ĝi tamen plue daŭris, plifortigata de benediktanaj misiistoj kiel *Paŭlinus* veninta en la jaro 625 al reĝo Edveno de Nordumbrio *(Edwin of Northumberland*). Ĝi fine venkis, unuiĝinte kun la iro-skotoj je la sinodo de *Whitby* en la jaro 664. Tamen restis speciale benediktanaj centroj, precipe en Vesekso (*Wessex*), t.e. okcidenta Saksujo kun modelaj monaĥejoj, ekz. Eksetro kaj Nurslingo (*Exeter / Nursling*).

Vinfrido, la knabo kaj adoleskanto

En la landlima regiono sur la duoninsulo *Cornwall* kie ankoraŭ libere vivis keltobritoj, komenciĝis la vivo de sankta viro nun konata sub la nomo

Bonifaco. Lia vivo estas envolvita en sekretoj kaj piaj historioj, por la edifado de la kredantaro. Legendoj kaj duonverajoj tenas sin en ekvilibro, raportantaj pri viro kiu servis sole al la viva Dio kaj al ties resurektinta filo, Jesuo Kristo. Aparte la biografio de monaĥo Vilibaldo (*Willibald*), la tielnomata "Vitao", estas plena de tiaj miraklaj eventoj, kiuj nur volas prezenti viron sanktan, destinatan vivi kaj morti por Lia Sinjoro. Kiom bele kaj sindone pie aŭdiĝas la bonifaca biografio, tiom atente oni devas kritike rigardi la realecon de la faktoj rezultantaj el eklezia kaj ŝtata ordoj.

Tiamaniere lia vivo reliefiĝas de diversaj flankoj. Nia scio ĉerpas el legendecaj resp. miraklecaj aferoj laŭ Vilibaldo, kaj el atestantaj diplomoj (laŭ multflanka korespondado precipe kun la papo). Tio kondukas al plenviva, populara tradicio, kiu karakterizas lin elstara kaj piega, do sankta.

Mirakla estis jam la nasko kaj la junaĝo de la knabo. Naskita en la jaro 672 aŭ 673 proksime al Eksetro, baptita al la nomo Vinfrido (*Winfried aŭ Vinfried*), deveninta el nobela familio - la nomo de la patro estas nekonata - jam en tre juna aĝo li serĉis la vojon al la Dia saĝeco kaj aspiris al monaĥa vivo. Instigis lin pilgrimantaj monaĥoj, kiu ne ĉesis trudi sin al li, kvankam la patro malinklinis al tiuspeca plenkreda sindonado. Li volis eduki la filon fariĝi agema bienulo. Kiam grava malsano minacis la vivon de la patro, post resaniĝo kvazaŭ laŭ Dia miraklo, li prezentis la filon al la abato *Wulfhard* de la monaĥejo Eksetro. Kun decaj vortoj la knabeto petis, ke oni akceptu lin al monaĥa vivado, ĉar tio estus lia arda deziro.

Tio ĉio estas laŭ Vilibaldo. Certe li intencis ĉirkaŭpreni la knabon kun aŭreolo, kaj pretigi la legantaron al postea vivo plenigita kun Dia spiritio. Pli verŝajne la knabeto estis transdonata al benediktana vivo de siaj gepatroj kvazaŭ kiel pia agado. Tiutempe oni faris tion ne malofte, por subteni la ekleziajn institucioĵn. Oni nomis tiajn infanojn "oferitaj knaboj" *(pueri oblati)*.

Tie en Eksetro la knabo lernis ne nur la benediktanan regularon, sed li ekzercis sin ankaŭ en la literatura arto. La latinan lingvon, ĝenerale uzatan en la tuta kristana mondo, li alpropriĝis profunde, precipe li ŝatis la metrikon - do, fari poemojn. Krome li distingiĝis per siaj artoj en retoriko kaj gramatiko, instigite de la fama Aldhelmo (ĉ. 640-704), erudito kaj abato de *Malmesbury*.

Certe la malgranda monaĥejo Eksetro estis nur lia unua edukhejmo, kiu ne povis doni al li multe da klereco. Pro tio li baldaŭ ŝanĝis al la monaĥejo Nurslingo (proksime al Vinĉestro). Tie li ricevis la abaton *Winbert* kiel instruiston, kiu instruis al li ĉion, kion li ne jam sciis. Li ensorbis la tutan biblian scion. Fine li regis la tutan sciencaron florantan en Anglujo, kaj mem fariĝis instruisto de monaĥoj en siaj fakoj jam delonge preferataj.

Eble en la aĝo de 30 jaroj (ĉ. 722-725) la monaĥo-kristana vivo de Vinfrido kompletiĝis, kiam li estis ordinita kiel sacerdoto, tre verŝajne de la anglolanda episkopo *Haeddi* de Vinĉestro. Nun, akirinte pozicion, kiu konformis al siaj monaĥaj erudicio kaj agemo, li montris novan kapablecon. Okaze de malakordo inter la anglaj episkopoj li estis sendita al la arkiepiskopo de *Kent* (705). Tie li prezentis la aferon tiom ekscelente, ke la arkiepiskopo konsentis al repaciĝo, kaj Vinfrido estis agnoskita pri sia elokvento. Per tio li pruvis, ke li povas regi ankaŭ publikajn aferojn sukcese. Kaj poste dum sinodoj oni serĉis lian konsilon. Tiamaniere li pretiĝis por ĉiuj taskoj bezonantaj liajn planojn kaj agadojn.

La misiisto

Instigite de tia agemo kaj sia interesiĝo pri eklezio-politikaj aferoj, li kolektis riĉajn spertojn pri la surkontinenta situacio, precipe en Frankujo. Ne restis kaŝite al li, ke la frankaj regnestroj malbone administris siajn diocezojn, eluzante ties episkopojn, kaj ke la kristanigo en la limlandoj ne sukcesis. Nome li spertis tion pri sia samlandano Vilibrordo, kiu provis misiadi ĉe la frisoj en nuna Nederlando, fondante monaĥejon en *Echternach* en postea Luksemburgo.

Vinfrido volis lin subteni per sia misia fervoro. Printempe de la jaro 716 tiu transŝipis al *Doristat* al la malsupra Rejno, centro de la frisa markomerco, ĉar tie ne agis Vilibrordo misie. Jam la frisa duko *Radbod* venkis kontraŭ la franka regno, tial lia misia projekto malsukcesis. Vinfrido do reiris al la monaĥejo Nurslingo. Tie, la monaĥofratoj volis elekti lin abato, pri kio li rezignis. Malgraŭ la vana misiado al Frislando, li persistis pri tiu agado, destinita de Dio kaj Jesuo Kristo. Li ne povis resti en Anglujo.

La duan vojaĝon Vinfrid' celis al la papo en Romo. Ekirinte tra Londono kaj Frankujo (en la jaro 718) li alvenis tie dum majo 719. Papo Gregoro IIa ne nur akceptis lin, sed ankaŭ favoris lin pro lia arda deziro porti la evangelion al la paganoj. Dum solena meso dediĉita al la sanktulo kaj martiro Bonifaco - laŭ legendo li estis mortigita en 300 en *Tarsus* - la papo donis ties nomon al Vinfrido, destinante lin agi kiel misiisto inter la paganoj: la 15an de majo, unu tagon post lia martirtago, hodiaŭ ankoraŭ festata (la 14-an de majo). Tiu graco de nomdonado, eligita ne sole de la papo sed ankaŭ de Sia Sinjoro Jesuo Kristo, plenigis la koron de la pia monaĥo tiom forte, ke de tiam li portis nur la nomon "Bonifaco", per kiu li famiĝis.

La returna vojo kondukis lin tra la langobarda lando, kies reĝo, *Liudprand*, lin akceptis afable kun ĉiuj honoroj, poste super la Alpoj al Bavarujo, kie li sentis malinklinon de la klerikaro kaj nobelaro. De tie li turnis sin al Turingio, vasta kampo de misiado. Sed tie li ne restis, ĉar intertempe

li eksciis, ke Radbodo, la rabema frisa duko mortis. Rapidpaŝe li pluvojaĝis al Frislando por renkontiĝi kun sia respektinda samlandano Vilibrordo. Subtenate de tiu, Vinfrido-Bonifaco faris sian unuan grandan misiadon, plene de ĝojo, Dia graco kaj sukceso (719). Tamen li ne restis. Vilibrordo, tiam jam episkopo de la nove instalita diocezo Utreĥto *(Utrecht)* kaj tre maljuna, serĉis firmteni lin kiel posteulon en sia propra diocezo. Sed, pie humila, Bonifaco petis sian honorindan episkopopatron pardoni: la Sankta Patro en Romo ja destinis lin observi misie la transrejnajn popolojn. Tion eksciinte, Vilibrordo donis al li sian benon kaj permeson forvojaĝi. Entute la misiado de Bonifaco en Frislando daŭris tri jarojn, dum tiuj li ne sole laboris en la vitejo de la Sinjoro, sed ankaŭ rikoltis multfoje.

La misiisto Vinfrido-Bonifaco en Germanujo, precipe en Heslando

Kien li nu direktis siajn paŝojn? Eble pensante al la Dia subtenado, kiam li pacigis la sovaĝajn frisojn, li volis doni la pacon ankaŭ al la turingianoj, kiuj forte suferis de la atakoj de nordaj najbaroj, la saksoj. Tiuj estis libera ĝermana nacio, etendiĝanta ĝis la Ĝermana Maro norden, al la interna germana montarlando suden, orienten al la riveroj *Elbe* kaj *Saale*, kaj okcidenten ĝis Frislando kaj la rivero Rejno.

Por atingi tiun celon, li vojaĝis unue al Treviro, la antikva romia urbo, poste ŝipveture laŭ Rejno almonte ĝis orienta flankrivereto *Lahn* kun la ĉirkaŭanta regiono, fine al la saksa limo. Do estis Heslando, kiun poste li tre ekamis. Komenciĝis la kora amo, kiam proksime de la *Lahn*-rivero li trovis ĉe kapeca monto lokon, nomatan *Amanaburch* (hodiaŭ *Amöneburg*), bienan posedaĵon de ĝemelaj fratoj *Dettik* kaj *Deorulf*.

Kion li tie ekvidis, tio preskaŭ ŝiris lian koron; sed, kredante en sia Dia devo kaj plenigite de la Sankta Spirito, li komencis sian evangelian agadon. Nome tiuj fratoj, laŭdire kristanoj, apenaŭ konfesis la beatigantajn solan Dion kaj Jesuon Kriston, sed readoris la ĝermanajn diojn, superstiĉe kaj misuzante la kristanan dogmon.

Bonifaco nun eksciis, kio mankis al la ĝermanaj hesoj. Predikante li redonis la veran evangelion al la ĝemeloj; ili ĵure neis sian hontindan idolservon kaj fariĝis la unuaj disĉiploj, konvertitaj de Bonifaco. Kune kun ili multaj enloĝantoj rekonvertiĝis al la dogmo de Jesuo Kristo, deĵurante sian paganismon.

Finagade, post kiam li trovis trupeton da plenkredaj disĉiploj, Bonifaco establis malgrandan monaĥejon. Same, plu vojaĝante al multaj lokoj de Heslando ĝis la saksa landlimo, li rekonvertis kaj baptis la homojn, deturniĝantajn de ilia pagana superstiĉo.

Dum tiuj agadoj Bonifaco pensis celtaŭge, informi la papon pri siaj sukcesoj. Tial li sendis mesaĝiston, sian samlandanon *Bynnan*, por ke tiu

raportu detale al papo Gregoro II-a, precipe la evangelizadon de tiom da paganaj hesoj. Ĝojigite la papo petis perletere revidi sian fidelan serviston.

Tuj post kiam Bonifaco estis ricevinta la skriban inviton de la papo, li ekvojaĝis (eble septembro 722) la duan fojon al Romo. Gregoro akceptis lin afablege, konvinkiĝante ke en la sindonema kaj humila Bonifaco li trovis ekscelentan majstron de misiado. Solene li investis tiun al misia episkopo sen rezidejo. Kun diversaj papaj leteroj al la turingia nobelaro, protektodonaj, Bonifaco returnis al la majordomo Karlo Martelo en Frankujo.

Dumvintre li restadis en la kortego de Karlo Martelo, la reala reganto de Frankujo, petante ties subtenon por sia estonta mesia agado. Tiel ekipite ankaŭ kun protektoskribo de Karlo mem, li reiris al sia hesa misiolando (printempo 723). Tie li intencis fari sian plej efikan misiaĵon: nome amasan baptadon.

Same kiel en *Amanaburch* tiel ankaŭ en la tuta regiono, proksime al la saksa landlimo, la popolo ne lasis sian malnovĝermanan Diaron, adoris sanktajn fontojn, arbarojn, bestojn (precipe ĉevalojn) kaj oferis superstiĉe al tiuj kaj faris sorĉadojn. Sur altleviĝanta monto ĉe loko nomata *Gaesmare* (hodiaŭ *Geismar*) kreskis grandega kverkarbo, konsekrita al Dio Donaro. Laŭ la ĝermana religio tiu regis la tondron. Je fulmotondro li veturas sur la nuboj en ĉaro, tirata de du fortegaj virŝafoj, per terurega bruo; vidante peke malbonfaranton surtere, li ĵetegas sian adzegon *Mjölnir* sur ties posedaĵon fulme kaj tondre.

Bonifaco riskis, inviti ĉiujn homojn de la vasta ĉirkaŭaĵo veni al tiu ĉi konsekrita monto. Li volis pruvi, kia Dio estas pli forta: ĉu ilia Donaro, ĉu lia propra Dio kun Jesuo Kristo, faligonte la ampleksegan kverkotrunkon. Kolektiĝis multe da homoj, viroj kaj virinoj, militemaj kaj pacemaj, infanaj kaj pliaĝaj, ĉirkaŭ la sanktejo, super kiu la dikegaj kverkaj branĉoj etendiĝis. Inter ili, ĉe la sanktaĵo, staris Bonifaco, la servisto de Dio, blanke vestita en la kostumo de benedikta ordeno, krede persista, kapleve, ĉirkaŭ li staris kelkaj fideluloj, tenantaj adzojn. Post kiam la tuta amaso grumble kvietiĝis li predikis pri Jesuo Kristo, pri liaj vivo, agado kaj mirakloj.

Sed tiuj piaj vortoj ne impresis la hesojn. Laŭ ilia imago tiu Jesuo devis esti potenca militisto kun amaso da militemaj adeptoj, sed ne mizera homo, mortinta sur kruco. Verŝajne - tiel oni supozis - Donaro punos la blasfemon. Kaj fakte, kiam nun la servistoj de Bonifaco, pleje monaĥoj, ekhakis la trunkon, tiel ke la branĉoj tremetis, grizaj nuboj alproksimiĝis; kun streĉiĝantaj haroj ĉiuj atendis la venĝon de Donaro. Sed okazis neatendaĵo: la nubaro disiĝis kvazaŭ forpelata de ĉiela potenco: Donaro do silentis, kaj

krevante la multbranĉa krono brukrake terenfalis. De la trunkego restis nur kvar rekte starantaj pecoj.

Ekvidante tian dian miraklon, la homamaso laŭdis Jesuon Kriston kaj konfesis lin. Nun ĉiuj ekkonis, ke li estis pli potenca, pli forta ol ilia militema, venĝema Donaro. Multe da ili estis baptataj de la sankta episkopo. Tiu, post interkonsiliĝo kun siaj monaĥejaj fratoj, konstruis el la kverkoligno preĝejeton, kiun li konsekris al la honoro de la apostolo Petro. La sankta loko estis nomata Petromonto (hodiaŭ *Petersberg*) kaj restis ĝis la nunaj tagoj.

Kvankam la edifega evento reliefiĝis en tuta la bonifaca agado, plenigata de la Sankta Spirito, la misiado progresis, pliampleksiĝanta en Turingio. Ĉar tie jam antaŭ multaj jaroj Vilibrordo evangelizis, fondante monaĥejon *Erphesfurt* (aŭ *Erpfesfurt*, nun *Erfurt*), sed ne daŭre, Bonifaco celis tien, kaj vidante la landon senorda, kvazaŭ vitejo, kiu bezonis multajn laboristojn, li fokusiĝis al la lokoj *Ohrdruf* kaj *Sülzenbrücken*, proksime al la urbo *Arnstadt*, establante tie monaĥejojn.

Malgraŭ tiuj sukcesoj Bonifaco ne kontentiĝis. Ekkonanta sian plej altan komision instali vaste etendiĝantan kristanan komunumon, do tutlandan eklezion, li devis sperti, ke tio ne estis realigebla sen ia subteno, kaj ke la respondeculoj, la nobelaro, la klerikaro, aŭ la majordomo Karlo Martelo nur malhelpis lin.

Kiamaniere li tamen povus atingi tian celon? La unua penso estis: la papo mem. De tempo al tempo li ja pensis necese informi la papon. En la jaro 726 li sendis mesaĝiston al Gregoro II-a. Tiu respondis (per letero de 22-a de novembro), sed nekontentige. Daŭris kelkajn jarojn, ĝis kiam ties sukcesinto Gregoro III-a donis bonaŭguran signon. En la jaro 732 li donis la paliumon al Bonifaco, ligitan kun la arkiepiskopa titolo, kiu rajtigis lin konsekri episkopojn.

La papa legato kaj arkiepiskopo en Ĝermanujo resp. Frankujo

Bonifaco, singarda kaj timemeta, ne riskis konsekri episkopon, ĉar la ŝtataj aŭtoritatuloj kontraŭstaris, ja ili celis nur sian propran potencon kaj rajton investi la altrangajn klerikojn, do ankaŭ la episkopojn. Tial stagnis la reformado, iniciatita kaj komencita de Bonifaco. Tamen li ne ĉesis labori. Ĉar en tiu tempo venis helpantoj el lia lando, inter ili parencino nomata Lioba (aŭ *Leobgytha*), kun ili li fondis la monaĥejojn *Fritzlar* ĉe la Petromonto, la iama ĝermana sanktejo, kaj ĉe la rivero *Main* - dekstra alfluo de rivero Rejno) *Tauberbischofsheim, Ochsenfurt, Kitzingen*. En *Tauberbischofsheim* li instalis Lioba-n kiel abatinon.

Lige kun tiuj fondaĵoj li travojaĝis la duklandon Bavarujo kaj renkontiĝis kun ties duko Odilo. Tiu planis reformadon de sia bavarlanda eklezio laŭ la

papokanona juro. Tiam aliĝis al Bonifaco la juna bavara monaĥo Ŝturmio *(Sturmius)* por asisti lin en ĉiuj liaj agoj.

Dum tiuj eventoj Bonifaco veturis la trian fojon al la papo en Romo. Li zorgis ne nur pri sia granda reform-agado, sed ankaŭ pri sia ebla posteulo, ĉar li jam atingis la aĝon je 70 jaroj. Akompanate de Gregoro de Utreĥto, kiun li deziris iĝi sia posteulo, li ekiris dum somero 737. Lia restado en Romo daŭris tutan jaron, kaj li uzis la tempon adori la sanktulojn ĉe ties tomboj aŭ relikvoj, konservitaj en diversaj preĝejoj. Precipe li petis la papan subtenon por siaj reformaj ordigo kaj organizado. Tio celis ĉefe ekskludi la frankajn landestrojn el ekleziaj aferoj kaj rajtoj. La investado de episkopo ne plu estu laŭleĝa ago de la franka reĝo aŭ majordomo, sed sole de la papo. Tiel la tuta franka eklezio fariĝu institucio de la rom-katolika kanonaro. Certe tiu ideo konformis nun al la intereso de la Apostola Seĝo, kaj pro tio papo Gregoro III nomumis Bonifacon legato por tuta Ĝermanujo. Tiu nun povis progresigi sian reformon pri organizado de la tuta franka eklezio sen iuj restriktoj.

Ankaŭ la problemo pri lia ofica posteulo estis solvita. Gregoro IIIa rajtigis Bonifacon libere elekti kaj instali la klerikon lin sekvontan. Bonŝance li trovis en Romo multajn anglosaksojn. Unu el tiuj, nomata Lulo *(Lullus)*, fariĝis lia kunlaboranto kaj restis ĉe li kiel sekretario ĝis 751. Nun Lulo akompanis Bonifacon reveturantan al Turingio, kie Lulo unue deĵoris en la monaĥejo *Ohrdruf*.

Ekipite kun la papaj beno kaj prokuro Bonifaco komencis sian reformagadon: Apogate de la duko kaj de la nobelaro de Bavarujo li tie enkondukis la papan dogmon, krome restarigis same la disciplinon ĝis tiam neglektitan en multaj ekleziejoj.

Malgraŭ tiu unua sukceso, helpate de la akceptemo de la bavara estraro, en aliaj partoj de la franka regno funkciis neniu novordigo ĝis la jaro 741. La grandpotenca majordomo, Karlo Martelo, mortis la 22an de oktobro kaj sekvis lin tri filoj: Pipino *(Pippin)*, Karlmano *(Karlmann)* kaj Grifo. Tiu lasta, nur duonfrato de ambaŭ pli aĝaj, ne estis agnoskata, eĉ ili arestis lin militire. Pipino kaj Karlmano kune regis, sed alie ol ilia patro. Ili simpatiis kun la maljuna papa legato kaj plenpie favoris ties planon je submetiĝo al la papa aŭtoritato, kvankam la franka nobelaro kon traŭstaris al ili.

Kiel dua, eble ĉefa paŝo de la reformado, Bonifaco kunvokis sinodon en Aŭstrasio al nekonata loko en la okcidenta ĝermana parto de Frankujo, ĝenerale nomata *Consilium Germanicum*, kie partoprenis la episkopoj de Aŭstrasio sen tiuj de Alemanio kaj Bavarujo. Ĝi estis prezidata de Bonifaco kiel papa legato, apogate de Karlmano ĉeestanta kiel konsilanto (21an de aprilo 742).

La reformaj decidoj koncernis jenon: reinstalo de la Dia leĝo (dogmo) laŭ la biblia, apostola kaj roma tradicioj, eklezia ordo laŭ la papaj instrukcioj, nova administracio de la diocezoj, paroĥoj kaj monaĥejoj, konstitucio de la aŭstrasia eklezio al metropolitejo, prezidata de la arkiepiskopo Bonifaco. Per sia ĉeestado Karlmano aprobis ĉion, garantiante la plenumon de la diversaj programeroj. Oni demandu, kion tio signifis, ĉar la majordomo estis ligita al siaj profanaj politikaĵoj kaj ne estis sperta en religiaĵoj. Respondiĝas jene: 1. Je tiu tempo la religio ne jam formiĝis science laŭ teologia vidpunkto; sufiĉis kiam reganto estis sindonema al ĉiuj religiaĵoj, ofte preĝis kaj penis observi la kristanajn devojn. 2. Tiuj devoj de reganto enhavis, ke li garantiis la integran posedaĵon de ĉiuj ekleziaj institucioj.

Tiam la posedaĵa afero estis en tre malbona stato. La franka nobelaro proprigis al si grandan parton de la eklezia bienaro - sekve de la militiroj kaj aprobita de Karlo Martelo. Nun Karlmano sin devigis, laŭ speciala sinoda decido tre grava, redoni ĉiun forprenitaĵon al la diocezoj, paroĥoj kaj monaĥejoj. Tamen tio ne ebliĝis. Kompreneble la militserva nobelaro kontraŭstaris. Solvon de tiu dilemo trovis la sekvajara sinodo de *Les Estinnes*. La iama eklezia bienaro ne estis redonita; la diocezoj k.t.p. rericevis ĝin kiel feŭdon. Ili rajtis utiligi ĝin, sed la posedanto restis la respektiva nobelulo aŭ reĝido. El tio fariĝis aranĝo, daŭranta dum la tuta mezepoko.

Bonifaco mem vidis en la sinodaj decidoj eblecon, reformi la tutan sacerdotan klason, kiu estis en vere malbona stato, spertita de li jam de multaj jaroj. Estis pastroj, kiuj sciis nek la ĝustan kredkonfeson, nek la plej gravajn bibliotekstojn. Kelkaj el ili vivis senbride kaj malĉaste aŭ kun konkubinoj. Ilin ĉiujn li forpelis el iliaj oficoj. (Iam perletere plendante, li skribis al la papo, ke eĉ la ĝermanaj paganoj ne toleris la eksteredzecajn seksajn rilatojn!) Maldignajn li konsideris ankaŭ la pastrojn, dediĉantajn sin al idoleco kaj superstiĉo - do al konfeso de la malnova ĝermana religio.

La arkiepiskopo severe kontraŭagis. Li postulis kaj ordonis la plenumon de la kristanaj devoj, kiuj inkluzivis modelecan vivsperton. Certe kelkfoje li troigis, konsiderante ĉion laŭ sia monaĥa vidmaniero. Sed entute li pravis, ĉar ankoraŭ restis kredaĵoj paganaj, regantaj la popolamason, kiuj estis ekstermendaj radikale.

La majordomon Pipinon, regantan super Neŭstrio, la okcidenta parto de Frankujo (la hodiaŭa Francujo, li ankoraŭ subtenis en la reformado, kvankam la maldisciplino tie ne tiom forte ekscesiĝis kiel en sia lando de metropolito Aŭstrasio.

La fondo de la monaĥejo Fuldo

Kvankam tutan Aŭstrasion Bonifaco tre ŝatis, li preferis la apartan regionon, kie unue li plensukcese misiadis faligante la Donarokverkon - la

landparton, hodiaŭ nomatan Heslando. Konekse kun la aŭstrasia sinodo li tie establis diocezon, nomatan *Büraberg*, ĉe Friclaro. Ties episkopon li konsekris post sia nomumo al papa legato. Ekster tiu episkopejo, eble situanta tro proksime al la saksa limo, li serĉis lokon por sia lasta restado, kie li atendu ĝis kiam la Sinjoro venigas lin al la eterna ĉiela vivo.

Sed kie ĝi estu en tia monteca regiono, kovrata de densa praarbaro, malofte tuŝata de homoj? Eble Bonifaco celis al difinita loko. Supozeble vojaĝinte al Turingio li konatiĝis kun loko oportuna por monaĥejo konstruota. Certiĝis, ke Karlmano donacis al li teritorion, situantan ĉe la rivero Fuldo, nomatan *Eichloh* (t.e. kverkarbaro), dum la kunveno en marto 742.

Sed oni devis serĉi ĝin en la densega arbaro. Favore al la projekto, Ŝturmio, komisiita de Bonifaco pri la monaĥejo fondota, jam fondis en 736 eremitejon ĉe la Fuldo elire de la Buraberga misio, poste nomata *Hersfeld*. Sed, instrukciite de sia mastro, komence de marto 744 li forlasis la lokon kaj marŝis laŭ la rivero kontraŭflue, ĝis kiam li atingis la indikitan lokon ĉe plilarĝiĝanta baseneca parto de la rivero. Tie, al ĝia dekstra, orienta riverbordo, Ŝturmio, kun sep monaĥofratoj, celebris la posedprenon la 12-an de marto, psalmante, preĝante kaj fastante. Tuj poste ili komencis kultivi la ruinecan terenon, kie antaŭe troviĝis merovinga reĝobieno (detruita de saksoj eble ĉ. 700). Por sia propra restado ili provizore konstruis kabanojn el tranĉoj kaj maldikaj trunkoj.

Jam dum majo Bonifaco alvenis, akompanate de konstrumetiistoj. Interkonsente kun Ŝturmio kaj la aliaj monaĥoj, li destinis la lokon por la preĝejo, memkompreneble konstruota el ŝtonoj; la masonistoj bezonis dek jarojn por finkonstrui tiun preĝejon, poste fariĝintan la nuna baroka katedralo. Unu semajnon Bonifaco restis, kaj poste ofte li revenis, ĉiujare almenaŭ unufoje, atente rigardanta la konstru-progreson de sia monaĥejo de sur proksima monto, tiam nomata "episkopomonto", hodiaŭ Monto de Nia Kara Virgulino *(Frauenberg)*. Simpla ligna domo gastigis tie la pian grandaĝulon. Tiu monaĥeja plantejo, situanta ne sole meze de Heslando sed ankaŭ meze de la ĝermana Frankujo, dekstre de la Rejno, fariĝis lia nova hejmloko, kie li destinis ejon por sia tombo.

La nova monaĥejo, baldaŭ akceptinta la nomon Fuldo laŭ la preterfluanta rivero, evoluiĝis dum malmulte da jaroj al fama centro de klereco kaj de bonifaca spirito pro tri faktoroj. Bonifaco unue zorgis, ke tie vivu la benediktana monaĥeco. Dum 747/748 Ŝturmio kun du monaĥoj restadis en la benediktana monaĥejo sur Montokasino en Italujo. Tie li ekstudis la regularon de la benediktana ordeno por efektivigi ĝin en sia monaĥejo, kie li abatiĝis. Due, Bonifaco atingis, ke la monaĥejo ne estu submetita nek al iu episkopo, nek al iu nobelulo, nek al la franka reĝo aŭ al la majordomoj Karlmano kaj Pipino; ĝi estis submetita nur al la papo, laŭ speciala privi-

legio, ĉar la monaĥejan terenon li ricevis de Karlmano por si mem - kiel donacon. Trie, neniam Bonifaco ĉesis komunikadi kun sia hejmlanda monaĥejo, kies skribkulturon li tre ŝatis. Li petis librojn, tiam mane skribitajn kaj pentritajn, por sia nova monaĥejo, precipe el Esekso *(Essex)*. Tiel la altaj klereco kaj libro-arto transiĝis al Fuldo kiel fama centro, aparte altestimata pro ĝia biblioteko, kie konserviĝis mondkonataj literaturaĵoj.

Nova ordigo de la frankaj diocezoj

Jam preskaŭ dek jaroj pasis, dum kiuj la maljuna papa legato kaj arkiepiskopo Bonifaco observis la diocezan novordigon. Kvankam ĝi ne evoluis tute laŭ lia volo, tamen fine li sukcesis helpe de la papo. Ankaŭ la majordoma estraro favorigis lian celon, kiam sole regis Pipino post la abdiko de sia frato Karlmano, kiu fariĝis monaĥo sur Montokasino (en 747). Kaj en 751 Pipino eĉ kroniĝis al franka reĝo, sendinte la lastan merovingan reĝon *Childerich* II-an en monaĥejon, interkonsente kun la tuta nobelaro kaj konsekrite de la papo (ne de Bonifaco). Per tio finiĝis la kontraŭstareco inter la majordomo kaj la papo, ĉu merite de Bonifaco laŭ lia eklezia novordigo, ĉu pro aktiveco de Pipino, tio ne reliefiĝas.

Certe, kiam fondiĝis la Fuldo-monaĥejo, Bonifaco kaj Pipino devis cedi. Ambaŭ intencis instali anglosaksojn kiel frankajn episkopojn. Sed la enlandaj nobelaro kaj klerikaro malaprobis tian agmanieron. Bonifaco verŝajne ekkonis la staton kaj kelkan tempon hezitis decidi; sed fine li kaptis la okazon, kiam arkiepiskopo *Gevilip* de Moguntio propramane mortbatis sakson, kiu dum milito mortvundis lian patron. Pro tiu eklezia dolo li devis perdi sian arkiepiskopan oficon. Bonifaco efektivigis ties eksoficigon dum la ĝenerala sinodo de 745, kaj fine li estis la posteulo (kun sia samlandano Lulo kiel arkidiakono, do vicepiskopo). Same Bonifaco enmiksiĝis en la anglajn aferojn, kie la klerikaro ne plu observis sian devon. En septembro 747 li atingis kunsidigi anglosaksan sinodon (de *Cloveshoe*), kiu provis forigi la klerikajn mankojn.

Bonifaco neniam agis arbitre. Ĉiam, per daŭra korespondado, li petis la papan aprobon. Tiel la rom-katolika eklezio de Frankujo unuiĝis en lia mano, escepte de Bavarujo, kies duko Odilo distanciĝis de li pli kaj pli, precipe kiam venis al Bavarujo la irlanda monaĥo *Virgilius* (irlande: *Feirgil*), malinklina obei al Bonifaco pro ties tro severa disciplino; fine tiu fariĝis episkopo de *Salzburg* laŭ la duka volo, malaprobite de Bonifaco (747). Tiu evento kaj aliaj aferoj kaŭzis, ke li sentis sin flankenŝovita, des pli multe, ĉar la majordoma potenco dediĉiĝis al liaj aferoj, t.e. eklezia novordigo kaj la ligo kun la papo. Sed Bonifaco eraris: lia spirito tiom penetris kaj enradikiĝis en la religia vivo, ke li mem ne plu devis zorgi pri ĝi, kaj ĝi postvivis lin, eble poreterne.

La lasta misia vojaĝo de Bonifaco kaj lia murdo

Sentante la baldaŭan finon de sia surtera vivo (li ja nombris pli ol okdek vivjarojn) Bonifaco sin direktis al tiu regiono de la franka imperio, kie li komencis sian misiistan agadon: al Frislando.

Ekde tiu tempo, kiam li kunlaboris kun Vilibrordo, la diocezo Utreĥto tre gravis al li, kaj por ĝi li aspiris pli grandan memstarecon. Do, en tiu afero dum printempo de 753 li iris al la novkronita reĝo Pipino, kiu plenumis la deziron per diplomo (je la dato de la 23a de majo). Plenĝoje Bonifaco vojaĝis la saman jaron al Frislando, kunpreninte Eobanon, kiun li investis en la diocezon Utreĥto.

Rememorinte la malsukceson de sia frisa misio antaŭ multaj jaroj, nun li povis ĝoje sperti, ke tiuj sovaĝaj frisoj kristaniĝis en paco kaj diotimo. Post kiam la vintron li estis pasiginta en Utreĥto, li entreprenis la sekvantan printempon novan misivojaĝon al norda Frislando. Alveninte tie, li renkontis multajn diotimajn frisojn, kaj li decidis festi la meson konfirmante tiujn kredofidelulojn. Akompanite de 50 viroj kaj diversaj klerikoj, inter ili troviĝis ankaŭ la ĵus investita episkopo Eobano, la sankta viro starigis siajn tendojn al la bordo de la rivereto *Bordne* (hodiaŭ: *Börne*) proksime al la loko *Dokkum*.

Tagiĝis la 5-a de junio - tiel rakontas la biografo Vilibaldo vive kun brulanta animo - kiam aperis el la proksima arbaro granda amaso da homoj. La kunuloj de Bonifaco, eklevinte sin el la nokta ripozo, unue kredis ilin la konfirmemuloj, sed tuj poste ili ekvidis ties brilantajn armilojn: lancojn kaj ŝildojn - ili estis malamikaj banditoj.

Kiam tiuj enpenetris la tendaron furioze kiel rabiaj hundoj, la piuloj prenis siajn armilojn por defendi sin same kiel Bonifacon kaj ĉiujn klerikojn. Sed la grandaĝulo levis sian voĉon dirante: "Viroj, lasu la batalon, formetu la batalon kaj ĉian uzon de armiloj. Agu laŭ la sankta skribo per ties teksto. Zorgu ke neniu reciproku al iu malbonon per malbono, sed ĉiu ĉiam sekvu tion, kio estas bona, unu por alia kaj por ĉiuj. Eltenu kion Dio ŝarĝas al vi. Ĉar per tio vi akiros la ĉielan regnon."

Sed la pagana hordo sin ĵetis sur ilin, kiuj martire atendis sian surteran finon por la ĉiela gloro, unuiĝonte kun Nia Savinto Jesuo Kristo, kaj mortigis ĉiujn masakrante per siaj glavoj. Bonifaco mem tenis meslibron antaŭ sia frunto, sed la glavo de la murdanto trapenetris ĝin, traborante la kranion de la sankta viro.

Kiam la silento de la morto kaj la korpoj de la murditoj sterniĝis super la detruita tendaro, la barbara paganaro sin ĵetis sur la predon, serĉante oron kaj riĉaĵojn. Sed, sovaĝe disrompinte la kestojn, oni trovis nur librojn, vestaĵojn. Fine la vino, trovita en la ŝipoj ebriigis ilin tiom forte, ke ili mal-

konkordiĝis kaj mortbatis unu la alian. Nur malgranda restinta grupo fuĝis de la malbenita loko, post kiam ĉiuj libroj estis disŝiritaj kaj disigitaj.

Tuj sekvis puno por la murdintoj. Ĉiuj postvivantaj banditoj estis kaptitaj kaj ekzekutitaj. La korpo de Bonifaco kaj de liaj kunuloj estis honorplene sepultataj. La restaĵoj de la martiroj estis enkriptigitaj en la preĝejo de Utreĥto. Lulo, en Moguntio, nelonge poste eksciis la malĝojan sorton de sia majstro kaj li sendis kelkajn virojn al Utreĥto por porti la kadavron de la sankta viro al loko destinita kiel lia lasta ripozejo. Komence la utreĥtanoj ne konsentis, ĝis kiam miraklo instigis ilin cedi: la sonorilo de la tombopreĝejo eksonis, sen ke ia homa mano estis tuŝinta ĝin.

Nun ŝipo portis la mortan Bonifacon sur la rivero Rejno al Moguntio, kie multaj klerikoj akceptis lian korpon altestime kun granda doloro. De tie oni portis ĝin tra la montara regiono sur malnova vojo al la monaĥejo Fuldo. La preĝejo, ĵus finkonstruita, iĝis lia tombejo. Ŝturmo, la abato, starigis altaron super la ripozejo de Bonifaco en la orienta absido. La ŝtona sarkofago plurfoje ŝanĝis sian lokon, ĝis kiam ĝi trovis dignan memorejon en la centro sub la ĉefaltaro de la monumenta katedralo.

Kronologio

672 (aŭ 675)	Vinfrido (Bonifaco) naskiĝis proksimume de *Exeter*
702 (aŭ 705)	Li estis konsekrata al sacerdoto
716	La unua misia vojaĝo al Frislando
719 (15-a de majo)	Misia komisio de papo Gregoro IIa, kiu donas al li la nomon Bonifaco
719	La dua misia vojaĝo al Frislando kiel subteno de Vilibrordo
722 (22-a de nov.)	Dum la vojaĝo al Romo li fariĝas misia episkopo sen rezidejo
723 (printempo)	Faligado de la Donaro-kverkarbo de *Gaesmare*, proksime de *Fritzlar*
737	Tria vojaĝo al Romo. Li fariĝas papa legato por Germanujo
742	Sinodo *Consilium Germanicum* en nekonata loko
742	Majordomo Karlmano donacas la lokon *Eichloh* al Bonifaco
743 (1-a de marto)	Dua sinodo aŭstrasia en *Les Estinnes*
744 (12a de marto)	Fondado de la monaĥejo Fuldo per *Sturmius* (Ŝturmio)
753	La tria misia vojaĝo al Frislando
754 (5a de junio)	Kun siaj kunuloj Bonifaco estas murdita proksime al *Dokkum*

Glosaro

Alemanio : Nomo de lando de ĝermana tribo aŭ tribo-ligo, loĝanta en sudokcidenta Germanujo *(Baden-Württemberg)*, Svislando kaj Alsacio. Ekde la 9-a jarcento la tribo estas nomata ŝvaboj *(Schwaben)*

Amanaburch / Amöneburg **:** Urbeto proksime al *Marburg*/Heslando, situanta sur monto kun ĉ. 1300 loĝantoj. Kvankam negrava el ekonomia vidpunkto, ĝi altiras pilgrimantojn kiel katolika centro en la ĉirkaŭanta protestanta lando. Ĝi estas kronita de katedralo, sin levanta sur la fundamento de preĝejo, fondita de Bonifaco. Ruino de kastelo pliperfektigas la silueton. Dum iama tempo ekzistis monaĥejo de la benediktina ordeno, verŝajne instalita de Bonifaco mem.

Anglosaksoj : Kolektivo de ĝermanaj triboj angloj, saksoj kaj jutoj, kiuj de la germana marbordo enmigris Brition (vd. sube) en la periodo 400-500, loĝata de keltaj britoj (vd. sube).

Tiujn ili forpelis okcidenten. Ili fondis kelkajn malgrandajn reĝlandojn. Dum la 9-a jarcento la reĝoj de *Wessex* unuigis la regnojn.

Aŭstr(as)io : La orienta parto de la franka regno, plejparte loĝata de ĝermanaj popoloj, kiel alemanoj (vd. supre), bavaroj kaj aliaj. Ĝi estas la ĉefa parto de la estinta (ĝis 1990) Federacia Respubliko Germanujo sen Malsupra Saksujo *(Niedersachsen)*.

Büraberg (Bjurabergo): Fortikigata monto proksime al la urbo *Fritzlar* (vd. sube) en Heslando. La fortikaj muroj estas elfosataj, same la fundamento de la preĝejo, fondita de Bonifaco. La samnoma diocezo ekzistis nur dum malmulte da jaroj. La monto, kovrata de ruinkampo, servas kiel tombejo.

Britio / britoj : La granda insulo, hodiaŭ enhavanta la regnojn Anglujo, Kimrujo kaj Skotlando, estis iam loĝata de la kelta popolo de la britoj indiĝene. Militbatite ili devis cedi ĉ. 400-550 al la angloj kaj saksoj (vd. supre)

Dokkum : Urbo en Nederlando, provinco Frislando, 30 km nordoriente de *Leeuwarden* kun 7000 loĝantoj. Iam ekzistis tie monaĥejo memore al la martiriĝo de Bonifaco, nuligita en 1580

Donaro : Unu el la Dioj de la ĝermana Diaro. Li apartenis al la plej altaj kaj kompetentaj pri la milito. Per la tondro li montras sian potencon. La martelo estis lia armilo. La nordĝermanoj nomis lin *Thor*.

Erphesfurt/Erfurt : Granda turingia urbo ĉe la rivereto *Gera* kun 190 000 loĝantoj. Ekde la germana reunuiĝo 1989/90 ĝi estas ĉefurbo de Turingio. Dum la mezepoko (ĝis 1803) ĝi apartenis al la arkiepiskoplando Moguntio/Majenco. Pro tio la loĝantaro estas ĝis hodiaŭ grandparte rom-katolika. La katedralo *St.Maria* kaj la proksima preĝejo *St.Severinus* atestas tiun katolikismon

Feŭdo : Tipe mezepoka ekonomia formo. Bieno aŭ alia proprietaĵo estas uzufrukta, kvazaŭ pruntedona, koncedita de reĝo, duko, nobelulo al subulo, nomita vasalo, kiu kontraŭŝuldas ian servon, plej ofte militan

Fritzlar (Friclaro) : Nordhesa urbo kun 8700 enloĝantoj. Ekzistas katedralo honore al la apostolo Petro *(St.Peter)*, preĝejo de la kanonika konvento, staranta sur la fundamento de monaĥeja preĝejo de Bonifaco, kaj diversaj aliaj preĝejoj. Proksime situas la *Büraberg* (vd.supre), la Petromonto, kie staris la Donaro-kverkarbo, kaj la loko *Gaesmare/Geismar* (vd. sube)

Fulda (Fuldo): 1. Okcidenta fontrivero de la rivero Vesero *(Weser)*. Ĝi venas el la *Rhön*-Montaro, parto de la germana mezmontaro (vd. sube), kaj fluas tra la orienta kaj norda partoj de Heslando. 2. Urbo kun 45 000 loĝantoj, situanta ĉe la rivero *Fulda* en orienta Heslando piede de la *Rhön*-montaro. La ĉefa parto estas la barok-kvartalo kun la katedralo (konstruita 1704-1711), kiu staras sur la fundamento de la monaĥeja preĝejo de Bonifaco. Multaj aliaj preĝejoj dekoracias la urbon. Ĝi estas, danke al Bonifaco, centrejo de la germana katolikismo kaj la rezidejo de episkopo, posteulo de la princ-abato (ekde 1752)

Gaesmare / Geismar : Malgranda vilaĝo proksime de *Fritzlar* (vd. supre) kaj la *Büraberg* (vd. supre), rekte proksime de la Petromonto, kie Bonifaco baptis la paganajn hesojn. Samnomaj lokoj (kiel la urbo *Hofgeismar*) ankaŭ pretendis la fame konatan eventon, sed malprave: estas pruvite nun, ke ĉi tie okazis la faligo de la Donaro-kverkarbo

Germana montarlando : Meze de Germanujo etendiĝas de oriento al okcidento vico da montaroj, limigitaj norde de granda malaltebenaĵo kaj sude de la rivero Danubo. Al ili apartenas ankaŭ la *Rhön*-Montaro.

Mezepoko (*G. Mittelalter, A. middle-ages, F. moyen age*) : Arte determinita periodo de la historia tempo fare de historiistoj. Ili komencigis la epokon en la jaro 375, kiam la romia imperio estis atakata de ĝermanaj triboj, precipe de la gotoj. La finon ili indikis per la malkovro de Ameriko per *Columbus* 1492.

Moguntio : Urbo ĉe la rivero Rejno, vidalvide al la buŝo de la rivero *Main* kun 150 000 enloĝantoj, ĉefurbo de la lando Rejnlando-Palatino *(Rheinland-Pfalz)*. *Moguntia* estas la latina nomo, ĉar la romianoj fondis ĝin en 13 a.K., uzata ankaŭ dum la mezepoko. Germane ĝi nom-

iĝas *Mainz*. La arkiepiskopo de Moguntio forte gravis en la germana historio, ĉar li kunelektis la germanan imperiestron.

Montokasino / *Monte Cassino* : Origina monaĥejo de la ordeno de la benediktanoj, nomata laŭ *Benedikt de Nursia*, kiu ne nur fondis ĉi tiun religian komunumon en la jaro 529, sed ankaŭ la monaĥejon sur ĉi tiu monto, situanta en la itala montaro Apeninoj. Laŭ ĝiaj reguloj estis poste fonditaj multaj aliaj monaĥejoj kiel ekz. *Fulda*.

Neŭstrio : Okcidenta parto de la franka regno kun la ĉefurboj Parizo kaj *Soissons*. La nomo signifas "nova lando". Ĝi preskaŭ kongruas kun la centro de nuna Francujo.

Orient-romia imperio : La Romian Imperion, ĉirkaŭantan la Mediteraneon, disdividis imperiestro *Theodosius* en 395 en du partojn, la okcidentan kun Romo kiel ĉefurbo kaj la orientan, kies ĉefurbo estis Konstantinopolo, la nuna *Istanbul*. Okcidenta Romio disfalis cent jarojn poste en diversajn partojn. Orienta Romio rezistis dum mil jaroj (ĝis 1453). Dum la bonifaca tempo apartenis al ĝi preskaŭ la tuta balkana duoninsulo, Anatolio (hodiaŭ: Turkujo) kaj partoj de Italujo.

Paliumo : Vestaĵa insigno de la papo kaj de la arkiepiskopoj, konsistanta el blanklana rubando kun ses nigraj krucoj. Ĝi estas portata ĉirkaŭ la kolo kun du malsupren pendantaj strioj sur la brusto kaj sur la dorso.

Pipina donacaĵo : Donaco de reĝo Pipino (de Frankujo) al la papo Stefano II-a per teritorioj en norda kaj meza Italujo (753). En tiuj regionoj, ampleksantan la urbon *Ravenna* kaj zonon tra meza Italujo (kun Romo) la papo regis memstare kiel suvereno, protektata de Pipino respektive de ties posteulo. Per tio fondiĝis la Vatikana (aŭ papa) Regno, ekzistanta ĝis 1860, kiam Italujo unuiĝis. (La nuna Vatikana Regno ampleksas nur kvartalon de la urbo Romo ĉirkaŭ la katedralo St. Petro.)

Saraceno(j) : Dum la kristana mezepoko tiel estas nomataj ĉiuj araboj kaj islamanoj, kiuj invadis kristanajn landojn okupante kaj regante.

Literaturo

Th. Schieffer. Winfried-Bonifatius und die christliche Grundlegung Europas (Vinfrid-Bonifaco kaj la kristana fundamentigo de Eŭropo). *Wissenschaftliche Buchgesellschaft, Darmstadt, 1972 (germanlingva)*

Reinhold Rau : Bonifatii epistolae. Willibaldi vita Bonifatii. (Briefe des Bonifatius. Willibalds Leben des Bonifatius) (Leteroj de Bonifaco. Vivo de Bonifaco skribita de Vilibaldo). En: *Ausgewählte Quellen zur deutschen Geschichte des Mittelalters. Freiherr vom Stein - Gedächtnisausgabe* (Elektitaj fontoj al la germana historio de la mezepoko. Eldono memore al barono vom Stein). Eldonita de *Rudolf Buchner* lige kun multaj fakuloj, Vol IV b, 1968 (parte latina, parte germanlingva)

Adreso de la aŭtoro:

Gerhard KALKHOF
An der Ritsch 17
DE - 36341 - Lauterbach / Germanio

Priaŭtora informo:

S-ro *Kalkhof* estas emerita instruisto mezlerneja. Ĉi tiun gradon li akiris antaŭ 30 jaroj en la fako "Historio"; krome li forte okupiĝis pri loka historio: interalie li verkis dikvoluman historion de sia iama oficloko *Ilbeshausen-Hochwaldhausen*. Kiel esperantisto li verkis jam kelkajn historiaĵojn por Scienca Revuo. Al tio antaŭ kelkaj jaroj necesis dusemestra historia studado per radio-kurso universitata.

Scienca Revuo Vol. 51 (2000) (3)

Psikolingvistika taksado de vortofarado de *mal*-vortoj en Esperanto: Apliko al franclingvanoj [1]

NAGATA Hiroshi
Okajama Universitato

Resumo

Tiu ĉi studo esploras la distribuon de la prefikso *mal-* en Esperantaj adjektivoj kaj verboj el du flankoj: lingvistika markiteco kaj juĝado de parolantoj. Kvindek franclingvanoj juĝis 40 parojn da kontraŭaj vortoj pri tio, kiu el du kontraŭaj vortoj estas primara. Analizo montris, ke distribuo de *mal-*konvenis plejparte al la lingvistika markiteco kaj/aŭ al la juĝadoj de parolantoj. Tamen ankaŭ troviĝis kelkaj vortoj, kiuj kontraŭstaris al la lingvistika markiteco kaj/aŭ al la juĝadoj. La influo de la franca sur la vortofarado de *mal*-kontraŭvortoj estis rimarkebla; tamen la rolo de frekvenco kiel faktoro determinanta radikon de *mal*-kontraŭvortoj estis neklara.

Enkonduko

La prefikso *mal-* en Esperanto signifas "rektan kontraŭaĵon de la ideo" (*Zamenhof*, 1887, p.233). Tiu ĉi prefikso, same kiel aliaj prefiksoj kaj sufiksoj, sendube plenumas gravan rolon en vortofarado en Esperanto, ŝparante la nombron de radikvortoj kaj sekve helpante facilan lernadon de la lingvo. Antaŭaj konsideroj pri la prefiksigo per *mal-* koncernas plejparte stilajn malavantaĵojn kiuj okazas pro oftega uzado de la prefikso (ekz. *Waringhien*, 1959; *Kalocsay & Waringhien*, 1985). Tiuj malavantaĝoj inkludas, ekzemple, longecon kaj pezecon de *mal*-vortoj kaj monotonecon de la stilo kiu entenas tro da *mal*-vortoj. Malmultaj tamen estas konsideroj pri kiu el la du kontraŭaj vortoj rilatigeblaj per *mal-* rajtas stari kiel la radiko. *Waringhien* (1959) nur mencias, ke *Zamenhof* "rigardis la kunmetadon per mal- nur kiel helpan rimedon por esprimi ideon, por kiu ne ekzistas vere internacia radiko" (p. 247).

Antaŭ pli ol dudek jaroj *Nagata* (1977) esploris la prefiksigon per *mal-* el du flankoj, lingvistika kaj psikologia. Ĉe lingvistika flanko, li uzis la dis-